



DIO BENU

Gazeto de IKUE-Katolika Sekcio de ĈEA
Agnoskita kiel laika eklezia organizaĵo

Jaro 2025 (35)

Numero 3 (139)

FORLASIS NIN LA PAPO FRANCISKO

En la Paska Lundo la 21-an de aprilo 2025 ĉirkaŭkuris la mondon malĝoja informo, ke tiutage matene je la 7:35 horo revenis la Sankta Patro Francisko en la domon de la Patro. La tutan vivon li dediĉis al la servo al Dio kaj la Eklezio.



La papo Francisko, propranome Jorge Mario Bergoglio, naskiĝinta la 17-an de decembro 1936 en BuenosAjreso en Argentino kaj mortinta la 21-an de aprilo 2025 en Domo de la Sankta Marto en Vatikano, estis laŭvice la 266-a papo de la katolika eklezio, la unua papo devenanta el la amerika kontinento kaj la unua el Kompanio de Jesuo.

Entombigita li estis la 26-an de aprilo 2025 laŭ lia deziro en Baziliko de *Santa Maria Maggiore* en Romo, kiun li vizitis 126 fojon por esprimi sian sindonemon al la Virgulino Maria antaŭ ikono *Salus Populi Romani*.

Ni konfidas animon de la papo Francisko en senfinan mizerikordan amon de la Triunua Dio, kies fidela servanto li estis.

POST RESUREKTO LA ESPERO NE PLU ESTAS ILUZIO

Lasta parolado de la papo en beno Urbi et orbi (Al la urbo kaj la mondo) la 20-an de aprilo 2025.

El malplena tombo en Jerusalemo alvenas al ni rara mesaĝo: Jesuo, Krucumita, „ĉi tie ne estas, Li resurektis“ (Luk 24,6). La amo venkis malamon. La lumo venkis tenebron. La vero venkis mensogon. La pardono venkis venĝon. La malbono el nia historio ne malaperis, ĝi restos ĝis la fino, sed ĝi ne plu regas, ĝi ne plu havas povon super tiuj, kiuj akceptas gracon de tiu ĉi tago.

En martirigo kaj morto de Jesuo Dio prenis sur sin ĉiun malbonon de la mondo kaj per sia mizerikordo Li venkis ĝin. La Ŝafido de Dio venkis! Tial ni hodiaŭ vokas: „Kristo, mia espero, resurektis!“ Post resurekto la espero ne plu estas iluzio. Danke al la krucumita kaj resurektinta Kristo la espero ne trompas! Tiuj, kiuj fidas je Dio enmetante siajn gracilajn manojn en lian grandan kaj fortan manon, kiuj lasas sin ekstarti kaj ekiri vojon: kune kun resurektinta Jesuo ili iĝas pilgrimuloj de la espero, atestantoj de la venko de la amo, de la ne-armita povo de la vivo.

Dio kreis nin por vivo kaj Li volas, ke la homaro denove ekstaru. En liaj okuloj ĉiu vivo estas valora! La vivo de la infano en la patrino, same kiel la vivo de la maljunuloj aŭ malsanuloj, kiuj estas en ĉiam pli multaj landoj opiniataj kiel tiuj, de kiuj estas necese senigi sin.

Mi volus, ke ni hodiaŭ revenu al espero kaj fido al aliuloj, ĉar ni ĉiuj estas infanoj de Dio! Mi volus, ke ni revenu al espero, ke la paco estas ebla! El Templo de la Dia Tombo la lumo de la paco trariluzigis la tutan Sanktan Landon kaj la tutan mondon. Mi estas proksima al suferado de la kristanoj en Palestino kaj Israelo, same kiel al la tuta israela kaj palestina popoloj. Mi estas mal-

trankviligita pro kreskanta atmosfero de antisemitismo, kiudisvastiĝas tra la tuta mondo. Ni preĝu intence de kristanaj komunumoj en Libano kaj Sirio eĉ por loĝantoj de Jemeno.

La resurektinta Kristo elverŝu sur suferantan Ukrainion donacon de la paco kaj instigu ĉiujn al plua strebado pro ekrego de justa kaj daŭra paco. La Resurektinto donacu pacon kaj konsolon al homoj en Afriko, kiuj estas viktimoj de perfortoj kaj konfliktoj, kaj Li subtenu kristanojn, kiuj en multaj lokoj ne povas libere praktikadi sian kredon.

Neniu paco eblas sen vera senarmigo! La bezono, ke ĉiu nacio garantiu al si propran defendon, ne estu ŝanĝita je ĝenerala armkonkuro. Mi alvokas ĉiujn, kiuj portas politikan respondecon, ke ili eluzu haveblajn fontojn por helpo al bezonuloj kaj por batalo kontraŭ malsato. Ni ne permesu, ke principo de homeco malsukcesu kiel fundamenta piliero de nia ĉiutaga agado. Vid al vide al atakoj kontraŭ civiluloj, lernejoj, hospitaloj kaj humanitaraj laborantoj ni ne forgesu, ke ne estas trafitaĵoj celoj, sed homoj kun animo kaj digneco. La Pasko estu okazo al liberigo de militaj kaj politikaj malliberuloj!

La Sinjoro vivas poreterne kaj Li instigas al ni certecon, ke ankaŭ ni estas vokitaj al partopreno en la vivo, kiu ne konas finon kaj en kiu ne plu aŭdiĝos tintado de armiloj eĉ ne reeĥoj de la morto. Ni konfidu nin al Tiu, kiu unusola povas fari ĉion novan (kp. Apo 21,5)!

(el vaticannews, mallongigita)



HABEMUS PAPAM – NI HAVAS PAPON

La usona kardinálo Mons. Robert Francis Prevost - la papo Leono la XIV-a



ESTU KUN VI ĈIUJ PACO! La unuaj vortoj de la nova papo Leono la Dekkvara.

La elekton de la 267-a papo en historio de la katolika eklezio anoncis blanka fumo el fumtubo super Siksta Kapelo en Vatikano je la 18:07 horo ĵaŭdon la 8-an de majo 2025. Elektita estis la 69-jara usona kardinalo Robert Francis Prevost el Ĉikago, kiu elektis por si nomon Leono la XIV-a.

Robert Francis Prevost en la jaro 1977, en siaj dudek du jaroj eniris aŭgustenan ordenon. La sacerdotan ordinaron li akceptis en la jaro 1982 en Romo, en la jaroj 2001 ĝis 2013 li estis ĝenerala prioro de aŭgustenanoj, sekve la papo Francisko nomumis lin apostola administratoro de perua diocezo Chiclayo, kie li estis nomumita dioceza episkopo. En la jaro 2023 lin nomumis la papo Francisko kardinalo. Temas pri la unua ĉefo de la katolika eklezio devenanta el Usono. La papon elektis 133 kardinaloj malpli aĝaj ol 80 jaroj. La elekton de la papo atendis sur la placo de la Sankta Petro en Vatikano pli ol kvardek mila homamaso.

La sekvan tagon, do unu tagon post sia elekto, la 267-a papo Leono la Dekkvara celebris en Siksta Kapelo la sanktan meson kun kardinaloj memorigante al ili, ke „ni devas atesti pri nia ĝoja fido je Kristo“, kaj samtempe li avertis, ke tie, kie la fido mankas, la vivo perdas sencon.



La unuan homilion li komencis per vortoj: „Fratoj kardinaloj, mi instigas vin, ke vi enpensigu pri la mirakloj, kiujn faris la Eternulo, pri la benoj, per kiuj nin la Eternulo per la Petra servo senĉese pridonacas. Vi vokis min, ke mi portu tiun ĉi krucon kaj ke mi estu benita per tiu ĉi misio, kaj mi scias, ke mi povas sin apogi je ĉiu el vi, ke vi kuniros kun mi kiel eklezio, kiel komunumo de amikoj de Jesuo, kiel kredantoj, ke ni anoncu Bonan Mesaĝon, la evangelion.“

SIGNIFO DE BLAZONO KAJ DEVIZO DE LEONO LA XIV-A

La Gazetara Centro de la Sankta Seĝo publikigis oficialan eksplikon de la blazono kaj devizo de la papo, sur kiu precipe videblas brulanta koro trapikita per sago kaj subapogita per libro, la simbolo de la aŭgustenana ordeno, kiu simbole prezentas vortojn de la sankta Aŭgusteno el la naŭa libro Konfesoj: „Vi trapikis mian koron per via amo“.


Sur la blazono de Leono la Dekkvara, „sur la ŝildo kun arĝenta mitro ornamita per tri oraj strioj“, elstaras arĝenta lilio kaj brulanta koro trapikita per sago kaj subapogita per libro. Tiun ĉi informon publikigis la Gazetara Centro de la Sankta Seĝo, kiu aperigis oficialan eksplikon de la blazono de la 267-a papo, priskribita fare de vicprezidento de la Itala Heraldika kaj Genealogia Instituto s-ro Antonio Pompili.

Lilio kaj koro

La papa emblemo, „ligita kun ŝlosiloj de Petro“, kunligitaj per ruĝa rubando, estas dividita je du partoj, la unuan kun blua fono, „la koloro memoranta ĉielajn altaĵojn kaj karakterizan por Maria, kaj tio per klasika simbolo referencanta la Virgulinon Maria-n, lilion (flos florum)“, la duan „en nuanco de eburo“, la koloro, kiun „oni povas interpreti kiel simbolon de sankteco kaj pureco“, kie „elstaras emblemo de la aŭgustena ordeno“, la koro trapikita per sago lokigita sur la libro. Tiu ĉi bildo simbole prezentas vortojn de la sankta Aŭgusteno lokigitaj en Konfesoj (la naŭa libro, 2,3): „Sagittaveras tu cor meum charitate tua, Vi trapikis mian koron per via amo“, precizigas s-ro Pompili.

La emblemo de aŭgustenanoj

La koro bildigita en la papa emblemo estas „ero“, kiu estas „ĉiam ĉeestanta en emblemo de aŭgustenanoj“ ekde la 16-a jarcento, „ĉe se en diversaj variantoj, kiel estas ĉeesto de la libro simbolizanta vorton de Dio, kiu povas metamorfi koron de



ĉiu homo, kiel tio okazis al Aŭgusteno“. La vicprezidento de la Itala Heraldika kaj Genealogia Instituto plue eksplikas, ke „la libro ankaŭ referencas al iluminitaj verkoj, kiujn la sankta Aŭgusteno, instruisto de la graco, donacis al la eklezio kaj homaro“.

En ununura Kristo ni estas unu

Se temas pri la devizo „In Illo uno unum“ („En ununura Kristo ni estas unu“), temas pri „la vortoj diritaj de la sankta Aŭgusteno en homilio“ (Ekspliko de la psalmo 127,3). Per tiu ĉi esprimo volis la granda patro de la eklezio emfazi, ke „kvankam ni kristanoj estas multaj, en Kristo ni estas unu“.

Tiziana Campisi – Vatikano, 14.5.2025

KONCILIO DE NICEO: LA HISTORIA KAJ AKTUALA PAĜO EN LA VIVO DE LA EKLEZIO

Antaŭ 1700 jaroj naskiĝis la Kredo, kiu unuigas kristanojn tra la tuta mondo.

La 20-an de majo, en la jaro 325, malfermiĝis en Niceo – nun Iznik en Turkio, la malgranda urbo 140 km sude de Istanbulo – la unua Ekumena Koncilio en la historio: la evento, kiu por ĉiam markis la vizaĝon de la kristana kredo.

De ĉi tie devenas la Nicea Kredo, sola respondo al la ariana herezo kaj klara proklamo pri la dieco de Kristo.

Inter la partoprenantoj estis juna Atanasio, estonta sanktulo kaj protagonisto de la defendo de la apostola kredo.

Kial gravas memori Niceon ankoraŭ hodiaŭ? Kio estas ĝia graveco?

Por bone kompreni tion, ni bezonas fari salton reen al la kvara jarcento.

En la jaro 313 imperiestro Konstanteno konsentis doni al kristanoj liberecon de

kulto, finante religian persekutadon tra la tuta imperio. Poste, en la jaro 324, Konstanteno fariĝis la plej alta aŭtoritato en la tuta imperio, kaj en la Okcidento kaj en la Oriento.

Li komprenis, ke doktrina polemiko riskis perturbi la pacon en la teritorio. Tial li decidis kunvenigi Koncilion de la tuta Eklezio por solvi la aferon. Li fakte konsciis, ke temas pri religia demando, sed li ankaŭ konvinkiĝis, ke religia unueco estas grava faktoro por politika stabileco.

De 250 ĝis 318, episkopoj el ĉiuj partoj de la Imperio alvenis en Niceon. La ĉefa celo estis defendi kaj konfirmi la fidon kaj doktrinon transdonitajn de la apostoloj pri la Dia kaj homa Persono de Jesuo Kristo, kontraŭ alia doktrino, kiu ŝteliris inter kristanoj, nome la penso de sacerdoto Ario de Aleksandrio en Egiptujo kaj liaj subte-



Fresko pri la Unua Koncilio en Niceo. Maldekstre antaŭe Konstanteno I-a la Granda

nantoj, kiuj asertis, ke Jesuo Kristo ne ĉiam estis Dio, sed la unua kaj plej sublima kreaĵo de Dio.

Estas kompreneble, ke tia mistero - la persono de Jesuo Kristo - reprezentis deficon al la homa inteligenteco. Sed samtempe, la atestoj de la apostoloj kaj de multaj kristanoj kapablaj morti – por defendi ĉi tiun kredon – estis pli forta.

Eĉ inter la episkopoj, kiuj ĉeestis la Konkilion, multaj ankoraŭ portis la spurojn de la torturo kaj sufero, kiujn ili eltenis pro ĉi tiu kialo.

La Konkilio difinis la kredon, sur kiu baziĝis kristanismo kaj kiun kristanaj eklezioj konfesas: Dio rivelita de Jesuo Kristo estas unika, sed ne soleca Dio: Patro, Filo kaj Sankta Spirito estas ununura Dio en tri apartaj Personoj, kiuj ĉiam ekzistis.

Memori Niceon hodiaŭ estas tial tre grava kaj aktuala:

Konkilio, kiu metis la fundamentojn por la sinoda strukturo de la Eklezio, kies pli grandan konkretecon ni hodiaŭ serĉas; Konkilio, kiu unuigis tagon de la celebrazo de Pasko por la tuta Eklezio (jarcentojn poste – ĝis hodiaŭ – kun la ŝanĝo de kalendaro, la dato tiam fariĝis malsama por la

okcidentaj kaj orientaj eklezioj) kaj kiu establighis bazŝtonojn de la kristanaj eklezioj.

Akcepti la Nicean Kredon kaj konfesi ĝin kune estas tial ekumene grava ankaŭ, ĉar la repaciĝo de kristanoj signifas repaciĝon ne nur kun kaj inter la Eklezioj en la nuntempo, sed ankaŭ kun la tradicio de la primitiva kaj apostola Eklezio.

Se ni volas konfesi kune, ke Jesuo estas Dio, tiam Liaj vortoj, precipe tio, kion Li nomas Sia nova ordono, la kriterio, kiun Li establis, por ke la mondo rekonu nin kiel Liajn disĉiplojn, akiros grandan valoron por ni.

Vivi ĉi tiun ordonon „estos la sola maniero paroli pri Dio hodiaŭ al tiuj, kiuj ne kredas, por igi la Resurekton de Kristo trudukebla en kategoriojn kompreneblajn por la hodiaŭa homo“. (Benedikto la XVI-a, Lumo de la Mondo, Vatikano 2010, paĝo 98).

La Kredo estis poste kompletigita en Konstantinopolo en la jaro 381, donante originon al la formulo, kiun ni ankoraŭ hodiaŭ deklamas ĉiun dimanĉon dum la Meso.

*Laŭ la Vatikanaĵ amaskomunikiloj
kompilis Jitka Skalická*

SANKTAJ KONSTANTENO (CIRILO) KAJ METODIO, apostoloj de slavoj aŭ slavaj kredheroldantoj, estis kristanaj misiistoj, sacerdotoj, monaĥoj kaj fratoj el Tesaloniko, kiuj kadre de sia misio en Granda Moravio akceptighis malnovslavan lingvon kiel liturgian lingvon, por kiu Konstanteno kreis ankaŭ skribon nomatan glagolico. En la jaro 1980 la papo sankta Johano Paŭlo la Dua ilin proklamis kiel kunpatronoj de Eŭropo. Ili ankaŭ estas ĉefaj patronoj de Moravio. En Ĉeĥio kaj Slovakio estas ilia festotago la 5-a de julio.


Sankta Konstanteno, nomata Filozofo, naskiĝinta en la jaro 827 en Tesaloniko, Grekujo, mortinta la 14-an de februaro 869 en Romo, estis pli juna ol Metodio. Siatempe li apartenis al la plej eminentaj siatempaj scienculoj, teologoj, oratoroj kaj poiliglotoj. Li monaĥighis mallonge antaŭ sia morto en Romo akceptinte ordenan nomon Cirilo.

Sankta Metodio, naskiĝinta en la jaro 813 en Tesaloniko, mortinta la 6-an de aprilo 885 en Grandmoravia Regno, estis pli aĝa frato de Konstanteno. Dum junaĝo li laboris kiel bizanca ŝtata oficisto. Post morto de Konstanteno li gvidis grandmoraviajn misiojn kaj li kulminighis ilian komunan verkon, pri kiu li zorgis ĝis sia morto. Unu el lia plej granda sukceso estis establo de moravia-panonia ĉefdiocezo, en kiu li iĝis la unua ĉefepiskopo.

KANTO AL SANKTAJ CIRILO KAJ METODIO *(5an de julio)*

Teksto: Fr. Karmela SCM, 1995. Melodio: Fr. M. Jaroslava. Tradukis Josef Cink, 1996.

Al Ci - ril' kaj Me - to - di - o, a - po - sto - loj de Sla - var',
por la kre - do kaj pro - tek - to so - nu ni - a dank - dek - lar'.
Kun Ma - ri - a en ĉi - e - lo pe - tu por ni pri li - ber',
pri pa - tru - jo, Ek - le - zi - o, in - ter - gen - ta pac', to - ler'.



LA KORVO KAJ AGLO

La sola birdo, kiu kuraĝas beki aglon, estas la korvo. Li surteriĝas sur la dorson de la aglo kaj mordas ĝian kolon. Tamen, la aglo ne respondas kaj ne batalas kontraŭ la korvo. Ĝi simple malfermas siajn flugilojn kaj komencas flugi pli alte en la ĉielo. Ju pli alte ĝi grimpas, des pli malfacilas al la korvo spiri, kaj ĝi finas fali pro manko de oksigeno. Same kiel la aglo, vi ne bezonas respondi al ĉiu batalo aŭ kritiko. Nur iru pli alten kun la Sinjoro kaj ili falos. Ĉesu perdi tempon kun korvoj. Nur prenu ilin ĉe via alteco kaj ili malaperos. Mi preĝas, ke Dio konduku nin al alteco, kie estos malfacile por la malamiko atingi nin.

Dio benu, protektu kaj ŝirmu nin!

Plej amike!

*Honoré Sebuho
el Norda Kivu/DR Kongolando*



Ĉiu domo havas sian sunplenan kaj ombrecan flankojn. Ĉiu homo havas siajn malbonajn kaj bonajn ecojn. Ne estas malbone esti en io bona. Sed neniu estas sufiĉe bona por tio, ke li estu senerara.

El pensaĵoj de la beata Martin Slomšek

GROTO

Iu bedueno estis persekutata per sovaĝaj malamikoj. Li fuĝis antaŭ ili, ĝis li alkuris al loko, kie dezerto transiĝis je kruda pejzaĝo plena de multlojaj rokoj. Li plukuris, ĝis fine ŝajnis al li, ke li ne plu aŭdas klakojn de la ĉevalaj hufoj de liaj malamikoj, kiuj persekutis lin. Li ne plu povis iri pluen, li tute elĉerpiĝis. Ĉirkaŭrigardante li ekvidis, ke li estas en kanjono, kiu faris al li timon. La muroj estis granitaj masivoj kaj nigra bazalto havis supre aspekton de turetoj. Kun mirego li rimarkis, ke en kruta deklivo estas piedpremita mallarĝeta pado. Li ekiris sur ĝi kaj post momento li troviĝis antaŭ enirejo en profundan kaj malluman groton. Tre singardeme li aliris randon kaj enigardis internen: „Eniru, frateto!“ La voĉo plena de afablo kuraĝigis lin. En duonlumo de la groto la bedueno ekvidis ermiton, kiu preĝis. „Ĉu vi ĉi tie vivas?“ demandis la bedueno. „Certe.“ „Kiel estas tio ebla, ke vi povas vivi en tiu ĉi groto tiel malriĉa, tiel malproksima de ĉiuj homoj kaj tute sola?“ La ermito ekridetis. „Mi ne estas malriĉa. Mi posedas grandajn trezorojn.“ „Kie?“ „Ekrigardu tien.“ La ermito montris etan fendeton supre en la grota muro kaj li demandis: „Kion vi vidas?“ „Nenion.“ „Ĉu vere vi nenion vidas?“ demandis la ermito. „Mi vidas peceton da ĉielo.“ „Peceton da ĉielo – kaj al vi ne ŝajnas, ke tio estas mirinda trezoro?“

Bruno Ferrero („Příběhy pro potěchu duše – Okazaĵoj por animeplezuro“)

MI PREĜAS KAJ PRIPENSAS

Eble ne nur infanoj, sed ankaŭ plenkreskuloj iam dumpreĝe diras vortojn, kaj tute ili ne konsciiĝas, kian signifon ili havas. Patro Pavel Jagoš multajn jarojn okupiĝis pri infanoj kaj junularo (li fondis tielnomatan Malgrandan Antioĥion, kiu organizadis feriajn restadojn por infanoj kaj junularo, kaj tion precipe por tiuj, kiuj alvenadis el nekredanta medio). Rekte kun helpo de infanoj – tiel, ke ĉio al ili estu komprenebla – li kompilis libron „Survoje al Dio aŭ Gvidilo en preĝo“.



SALUTON MARIA, Mi kliniĝas antaŭ vi salutante vin kun ĉefanĝelo Gabrielo, la heroldanto de Dio.

GRACOPLENA, Vi estas trabilita per sanktiganta graco jam ekde unua momento de via vivo, kaj tial plena de sankteco, boneco kaj amo.

LA SINJORO ESTAS KUN VI. Esceptmaniere vin Dio kondukas kaj ŝirmas kaj kun granda amo vin rigardas.

BENATA VI ESTAS INTER LA VIRINOJ. Vi estas super ĉiuj estuloj altigita kaj honorigata: Vin elektis Dio kiel Patrino de la Savinto de la mondo.

KAJ BENATA ESTAS LA FRUKTO DE VIA SINO, JESUO. De nia Patro sendita estas via Infano: Li estas Dio mem, kiu iĝis homo por nia savo.

SANKTA MARIA, DIPATRINO, Kiel potenca estas via propeto ĉe Dio, kiam vi estas Patrino de Dia Filo! Tial mi al vi vokas:

PREĜU POR NI PEKULOJ. Senĉese ni denove falas en niajn erarojn.

NUN En tiu ĉi tempo de la surtera vivo propetu por mi, por ke Dio donu al mi forton por pliboniĝo, ĝis mi ankoraŭ havas tempon rebonigi min.

KAJ EN LA HORO DE NIA MORTO. En la horo, kiu decidos pri nia eterneco. Petu por mi, ke estu al mi donite, kiam alvenos la decidema momento, post bona sankta pekconfeso akcepti Korpon de la Sinjoro kaj sub via protekto trankvile esti mortanta.

AMEN. Tiel fariĝu! Mi kredas je la forto de la preĝo.

Kiel ni primeditu tion, kion ni diras en la preĝo, se ni eĉ ne primeditas tion, kion ni diras en simplaj vivsitacioj? Ne nur paroli.

Ankaŭ ni diras al Sinjoro Dio belajn vortojn. Jam ĉe baptito ni diris al la Sinjoro Dio „jes“ aŭ tion anstataŭ ni tiam diris gepatroj kaj ni tion multfoje ripetadis. Kiel tio estis bela ekzemplo ĉe la unua sankta komunio. Ĉiuj estis kortuŝitaj. Sed kiam nin tiu „jes“ iom kostas, kiam ni devas ion abstini aŭ ion fari, ofte tio restos ĉe belaj vortoj de niaj preĝoj kaj kantoj. Ĉu ni pli prefere diru: „Sinjoro Dio, mi hodiaŭ tute ne emis ellitiĝi. Kaj televidon kaj komputilon mi pli amas ol Vin...“ Ie en la preĝejo antaŭ foriro oni kantas: „Se mi devas foriri de Vi, ĉiam mi foriras kun bedaŭro...“ Ĉu ni estus pli veremaj, se ni tion ĉe foriro el hejmo diradu pli volonte al televido kaj komputilo?

Mons. Jiří Mikulášek

EKKREDU AL TIU, KIU POVAS NEK ERARI NEK MENSOGI

Kiam ni kredas, ke dum la sankta meso la pano kaj la vino transsubstanciĝas je la Korpo kaj la Sango de Jesuo Kristo, ni ne povas tiun realecon verigi per niaj sensoj – ambaŭ ili aspektas same. Ni povas tion verigi al ni eĉ ne „per forto de racio“. Eĉ se ni la trassubstanciitajn hostiojn sendus por analizo al la plej elstara scienca laboratorio, ili ne trovus tie ŝanĝon. (Tamen ekzistas homoj kun kapablo, kiam antaŭ ili oni metas sur korporalon, la blankan tuketon, sur kiun oni dum la sankta meso metas la sanktajajn ujojn kun Korpo kaj Sango de Jesuo Kristo, kelkajn ne transsubstanciitajn hostiojn kaj ankaŭ unu transsubstanciitan, ili kapablas tucerte diri, kiu ĝi estas, kaj montri: tio estas la Korpo de la Sinjoro Je-

suo kaj tio estas nuraj panoblatoj – rim. de red.). La kaŭzo, kial ni kredas je vera ĉeesto de Jesuo Kristo en transsubstanciita pano kaj vino, estas, ke ni kredas al Jesuo Kristo kaj al lia vorto. Ni kredas, ke Li estas vera Dio, kiu iĝis vera homo. Kaj kiel Dio Li ne povas erari kaj mensogi. Tial ni ankaŭ al Li kredas, kiam Li al ni diras, ke lia Korpo kaj la Sango estas nutraĵo por la eterna vivo. Kaj ankaŭ ni al Li kredas, ke Li estas fonto de la forto por nia surtera vivo. Li ja diris: „Kiu min manĝas, tiu vivos pro mi.“ (Joh 6,57) La kredo je dieco de Jesuo estas por la kristano baza. De ĝi derivas ĉio cetera, kion ni ekkredis de Li.

*Sac. Pavel Zahradníček
(Milujte se 2016/39)*

PATRO, FILO KAJ AZENO

Patro kaj eta filo iris kun azeno en la urbon. La patro sidis sur la azeno kaj la filo iris apud la azeno. Renkontis ilin iu virino komencanta lamenti: „Tiel malgranda devanta piediri en varmego, dum lia patro estas sidanta sur la azeno. Kiel kruela.“ La patro do irante perpiede sidigis la fileton sur la azenon. Ili renkontis viron, kiu koleriĝis: „Kia do nuntempe estas la eduko, la juna veturas sidanta sur la azeno kaj la maljuna erpiĝas perpiede.“ La patro do sidigis sin malantaŭ la fileto kaj ili ambaŭ veturis sidantaj sur la azeno. Sed plua homo, kiun ili post nelonge renkontis, lamentis pro superŝarĝita azeno! Ili do ambaŭ iris apud la azeno. Renkontis ilin plua viro komencanta ridi: „Rigardu tiujn du frenezulojn, ili perpiede plandas kaj la azeno iras kvazaŭ sinjoro!“

• • •

Ne estas surmonde homo, kiu plaĉigus sin al ĉiuj... Ĉu mi ne klopodegas pri neebleco, ĉu ne regas min opinioj de ĉirkaŭo?

Jitka Krausová (el libro „Příběhy moudrosti – Okazať se saňoj.“)

Unu el gefianĉoj, kiuj sin preparis por geedziĝo, telefonis al paroĥejo:

„Patro, konsilu al ni iun biblian citaĵon por edziĝanonco, ni volas tien doni nur referencon.“

„Bone... Do provu tien doni 1 Joh 4,18.“

Sed la telefonado estis malbone aŭdebla. Sur la edziĝanonco poste anstataŭ 1 Joh 4,18 (Timo ne ekzistas en amo, sed perfekta amo elĵetas timon.) tie aperis citaĵo Joh 4,18 (Vi havis kvin edzojn, kaj tiu, kiun vi nun havas, ne estas via edzo)... (el: www.Katolik.cz)



La episkopo Mons. Antonín Basler kun sac. Mgr. Pavel Ryšavý - la paroĥestro en la urbo Kojetín la 6-an de aprilo.

la katolikaj E-tendaroj en la vilaĝo Herbortice (Ĉeĥio 1969-1977), por kuncelebri la sanktan meson memore al eminenta tiea samurbano ThDr. B. Dudík. Frato Václav eluzis la momenton por kunparoli kun la episkopo kelkajn frazojn en Esperanto.

Lasta adiaŭo kun fratino Lidmila Slezáková

En la aĝo de 70 jaroj forlasis nin la 5-an de majo fratino Lidmila Slezáková, nask. Venclová, la fidela ekspartopreninto de niaj katolikaj E-tendaroj okazintaj en la jaroj 1969-1977 en la vilaĝo Herbortice (Ĉeĥio). Dum la tendaroj ŝi multe helpadis al partopreninta handikapulino Cilka Kotyzová. Por tiu ĉi oferema servo ŝi certe ricevis rekompencan de la bona ĉiela Patro.

La sankta meso por la mortinta Lidmila okazis en la preĝejo de la sankta Jakobo en la urbo Česká Třebová. La ĉefcelebranto kun la pluaj kvin sacerdotoj estis ankaŭ fidela ekstendarano de Herbortice - la episkopo de Olomouc Mons. Antonín Basler.



La eksgetendaranoj partoprenintaj la lastan adiaŭon kun fratino Lidmila



Fotis Jiří Pospíšil

Ripozon eternan donu al fratino Lidmila, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al ŝi. Ŝi ripozu en la paco. Amen.

BONAJ HOMOJ

Iu homo revenis hejmen el vendejo, en kiu li matene aĉetumis. Li alpaŝis vendiston dirante al li: „Pardonu, ke mi ĝenas, sed hodiaŭ matene mi donis al vi milkronan monbileton kaj vi eraris, redoninte al mi reston.“ La vendisto respondis kun iom malagrabla tono. „Do, tio estas via misŝanco. Tion vi devis diri tuj. Nun jam estas malfrue!“ Kaj la aĉetinto diris: „Mi tion bedaŭrinde rimarkis nur pli malfrue – veninte hejmen. Sed tio tute ne ĝenas min. Mi venis al vi redoni centkronan monbileton, kiun vi donis al mi plie.“

Bonaj homoj do ankoraŭ ne formortis! Kaj kion vi? Ĉu ne formortas en vi bona homo, eĉ ne kiam vi renkontas iun malbonan?

Pino Pelegrino

Preĝeto

Ho, mia Di', Vi konas mian koron!
Kaj Vi scias, mi atendas la horon,
kiam la anim' estos sur la loko,
kie en gloro staras via trono.
Ho! Kion mi dirus al Vi tiam?
Jes! Anstataŭ Vi diras mia koro.
Vi estas la Bona kaj la Fidela,
kaj ĉe Vi estas la tuta gloro!
Al ni Vi sendis Vian karan Filon,
kiu por ni estis suferinta homo.
Pro Kiu al mi vi donis pardonon
kaj per kiu fariĝis mia peka koro
belega, pura, hela brila domo!
Kaj Vi scias, mi atendas la horon:
Ho mia Di', Vi konas mian koron!

Tibor Beššényei, Budapeŝto

BENADU!

Mi edziniĝis, kiam mi dudekjariĝis, el vera amo kaj dum du jaroj naskiĝis al ni du knabinoj. Mia edzo havis fraton loĝantan sur germana-pola landlimo, malproksima ĉirkaŭ tri kaj duono de vojhoroj. Ni vizitadis lin tie komence komune, sed poste, kiam estis infanoj, mi restadis kun ili hejme. La edzo poste kun siaj gepatroj mem tien veturadis.

Foje, estis tio komence de printempo, ili denove ekvojaĝis por viziti fraton. Antaŭ adiaŭo io senĉese instigis min, ke mi ilin benu. Instruis min tion mia patrino. Mi do ilin benis. Estis tio sabaton matene, kiam ili ekvojaĝis. Mi ilin konstante rememoris dum ilia vojaĝo. Kiam vesperiĝis, subite iu ekfrapetis pordon. Tre mi ektimis, sed ĉar kun mi estis mia patrino, mi do superis la timon kaj iris malfermi la pordon. Kaj kion mi vidas: en la pordo estas edzo eĉ kun siaj gepatroj. Sed ili ja devus reveni hejmen nur dimanĉe vespere. Ni ekdemandis, kio okazis, sed ili ne tro emis paroli. Laŭdire ili revenis perpiede el distanco de

dek kilometroj, neniu aŭtobuso tiam veturis. Malrapide ili komencis al ni rakonti, kio al ili okazis. En vojkurbiĝo laŭdire ilin antaŭveturis ŝarĝaŭtomobilo, tiel ke tiumomente sur la ŝoseo estis tri aŭtomobiloj apud si. La edzo devojiĝis ĝis vojrando, sed ĉar estis tio neĝkovrita, ili ne teniĝis rande de la ŝoseo, kaj ilia aŭtomobilo komencis rulmoviĝi el tridekmetra deklivo malsupren. Haltigis ilin falo de aŭtomobilo sur tubon kondukanta al iu fabriko kaj tie la aŭtomobilo duoniĝis. Sed neniu vundiĝis, la patrino, sidanta malantaŭe, havis nur kontuzitan dorson kaj bluan etfingron de la piedo. Kiam alveturis polico, la kulpanto jam forestis. La policianoj, kiuj akcidenton esploris, diris al la edzo, ĉar li ĵus havis naskiĝtagon, ke li duan fojon naskiĝis. Kaj mi konsciĝis, kial io min instigis, ke mi antaŭ ilia ekveturo benu ilin, ĉar ili nur mirakle tion transvivis. Kaj ankoraŭ multfoje dum la vivo mi ekkonis Dian protekton kaj helpon... *Marie*

El: Mihujte se 2013/26

MORGAŬ EKZISTAS

Mia nomo estas Morgaŭ (ne estas mia vera nomo), mi posedas firmaon, sed ne niu el miaj dungitoj scias, ke mi estas la posedanto, escepte la administranto kaj la sekretario (kiujn mi petis ne malkaŝi mian identecon).

Mi kutime ne faras vizitkontrolojn.

Iun tagon, mi vizitis la firmaon kaj mi vidis mian eksedzinon, tiun, kiu forpelis min el mia propra domo. Mi demandis la manaĝeron, kiu ŝi estas, kaj li diris, ke ŝi estas el dungitaro.

Mi tiam ordonis al la direktoro promocii ŝin al la posteno de dungitaro, doni al ŝi aŭton, bangalon, ĝardeniston, sekurgardiston kaj aliajn avantaĝojn. Posteno, kiun ŝi ne meritis, sed mi tamen donis al ŝi.

Monaton poste, mi revenis al la firmao kiel laborserĉanto. Tuj, kiam ŝi vidis min kun mia kandidatiĝo kaj mia resumo, ŝi senceremonie malakceptis min, ĵetis mian kandidatiĝon en mian vizaĝon, poste prenis ĝin de la tero por ŝiri ĝin en pecojn kaj ĵeti ĝin en la rubon.

Rememoriginte min pri mia tuta pasinteco, ŝi informis min, ke mi neniam ricevos laboron aŭ ŝancon en la firmao. Ŝi eĉ ĵuris per la ĉielo kaj la tero, ke tiel okazos. Ŝi memfide deklaris, ke la nura maniero kiel mi akirus laboron ĉe la firmao, estus preterpasi ŝian kadavron.

Sekvan tagon mi revenis kun alia aplikaĵo kaj surgenuiĝis por petegi ŝin, sed ŝi rifuzis kaj kraĉis en la rubujon dirante, ke eĉ se mi estus la sola ponto por veni labori, ŝi elektos boaton. Ŝi tiam vokis la sekurecajn gardistojn por eligi min, do mi foriris.

Iun tagon, mi iris al la kompanio sub mia vera identeco kaj eniris ŝian oficejon kun la administranto, kiu prezentis min al ŝi. Ŝi rapide genuiĝis, plorante kaj petegante min, la «malakceptita ponto». Ŝi informis min, ke ŝia tuta familio dependas de ŝi por pluvivi. Se ŝia laboro estus ĉesigita, ŝi aldonis, la vivo estus absolute terura ne

nur por ŝi, sed por ŝia tuta familio. Ŝi eĉ promesis reedziĝi kun mi.

Ni staris tie, senmovaj kaj senvortaj, kio lasis la direktoron perpleksa.

Multaj aferoj komencis trairi mian menson. Ĉu mi voku la policon? Ĉu mi degradi ŝin al ŝia malnova pozicio? Ĉu mi nuligu la negajnitajn profitojn donitajn al ŝi? Ĉu mi denove akceptu tian virinon?

Mi ankoraŭ staras en ŝia oficejo, nedecidita.

Se vi estus sur mia loko, kion vi farus?

ESTAS MORGAŬ

Kiam ajn vi traktas kun homoj, vi ĉiam devas memori, ke estas morgaŭ kaj vi eble bezonos ilin morgaŭ. Vi eble bezonos helpon de la homoj, kiuj petas de vi helpon hodiaŭ, do helpu kiom vi povas.

La vivo estas kiel ŝpinrado, foje vi estas supre, foje vi estas malsupre. Foje ni detruas la pontojn, kiujn ni eble bezonos por helpi nin reiri trans morgaŭ. Foje ni traktas homojn, kvazaŭ neniam estos morgaŭ. Ni kelkfoje agas kvazaŭ ni neniam bezonus helpon de iu ajn. Memoru, ke estas morgaŭ.

Jozef helpis la viniston en malliberejo, kaj poste la vinisto ligis Jozefon kun Faraono. Imagu, kiel sentis la edzino de Potifar, kiam ŝi eksciis, ke Jozef fariĝis la guberniestro de Egiptujo, post malvere akuzi lin.

La fratoj, kiuj vendis Jozefon, estis nutritaj de li. Neniam pensu pri iri al ekstremoj kun viaj krimuloj, ili povus esti viaj savantoj por morgaŭ. Memoru ĉiam, ke estas morgaŭ kaj ĝi certe venos.

La malgranda helpo, kiun vi donas al homoj hodiaŭ, profitos vin morgaŭ.

La bona Dio tuŝu vian koron, por ke vi vivu vian vivon sciante, ke estas morgaŭ.

En ĉio, kion vi faras, memoru: Morgaŭ estas ĉi tie.

Mi nur esperas, ke vi lernis ion.

Honoré Sebuhoro el DR Kongolando



NI KONDOLENCAS

Mi sendis leteron al nia longjara membrino fratino Hana Baťová kaj responde mi ricevis sciigon pri ŝia forpaso la 9-an de aprilo 2025. Kiam organizis nia IKUE-Katolika sekcio 14 tendarojn en Sebranice apud Litomyšl, ŝi kun sia edzo ofte vizitis la tendaron en proksimeco de ilia loĝvilaĝo Horní Újezd. En la jaro 1999, kiam la tendaro okazis la 9-an fojon, vizitis ilian hejmon ankaŭ du tendaraninoj el Suda Koreio, kiel tion dokumentas jena bildo.



Ripozon eternan donu al fratino Hana, Sinjoro, kaj la senfina lumo lumu al ŝi. Ŝi ripozu en la paco. Amen.

Proverbo

La maljuneco povas esti malfeliĉa kaj malĝoja - sed simile tia povas esti ankaŭ la juneco.

Sed kiam mi komparas ambaŭ, mi vidas, ke la maljuneco, ja eĉ spite de malfortecoj, kiujn ĝi alportas al mi, ne avaras je ĝojo; nur koloroj kaj fontoj de tiu ĉi ĝojo estas aliaj.

Alexandr von Humboldt

KIAL LA EKSEDZIĜOJ DE AFRIKAJ PAROJ ESTAS INTENSAJ EN AFRIKA SOCIO?

Enkonduko

Eksedziĝo estas fenomeno, kiu kvankam disvastigita tra la mondo, prezentas konsiderindajn apartaĵojn en la afrika kunteksto. En Afriko, la kialoj de eksedziĝo ofte estas multoblaj kaj influitaj per kulturaj, sociaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj. Ĉi tiu intenseco en eksedziĝoj en afrikaj socioj meritas profundan analizon, ĉar ĝi influas ne nur la familian strukturon, sed ankaŭ la socian kaj ekonomian stabilecon de individuoj kaj komunumoj.

LA SOCIOKULTURAJ KAŬZOJ DE EKSEDZIĜOJ EN AFRIKA SOCIO

1. La evoluo de tradiciaj valoroj

Historie la afrikaj socioj havas fortajn komunumajn valorojn, kiuj favoras la grandan familion. Tamen, ĉi tiuj valoroj iom post iom estas pridubitaj de moderneco kaj tutmondiĝo.

La tradicia rolo de virinoj hejme (ofte kiel patrino kaj obeema edzino) venas en konflikton kun la aspiro al individua aŭtonomio, precipe en grandaj grandurboj, kie aliro al edukado kaj al la laboro estas pli facila.

2. Malsamaj atendoj inter geedzoj

La geedziĝo en Afriko ofte estas rigardata kiel sankta kaj daŭra institucio, sed la atendoj de partneroj povas diverĝi. La socia premo sur virinoj por esti la «ideala patrino» kaj la «perfekta virino» en kunteksto de patriarkeco povas konduki al streĉitecoj, precipe kiam ili iĝas emancipitaj.

Krome, viraj atendoj de virinoj laŭ fideleco, hejmaj roloj kaj generado estas foje malfacile renkonteblaj.

3. Kulturaj diferencoj inter generacioj

Junaj generacioj, influitaj de modernaj

kaj foje individuismaj ideoj, povas konflikti kun la tradiciaj valoroj de antaŭaj generacioj. Ĉi tio povas konduki al eksedziĝo, kiam familiaj atendoj estas konsiderataj malnoviĝintaj.

II. EKONOMIAJ KAJ POLITIKAJ FAKTOROJ INFLUANTAJ EKSEDZIĜOJN

1. Ekonomia malfortikeco kaj financaj streĉitecoj

Malfortikaj ekonomiaj kondiĉoj en Afriko, markitaj de senlaboreco, malriĉeco kaj seksa malegaleco en la labormondo, kreas fincan streson, kiu povas pliseverigi streĉiĝojn ene de paro.

Virinoj, precipe en kamparaj lokoj, ofte havas malmulte da financa aŭtonomio, kio igas ilin vundeblaj al situacioj de hejma perforto aŭ edzeca malekvilibro.

2. Migrado kaj la rolo de la kampara elirado

Kampara elirado kaj rapida urbigo kreas geografian apartigon de familianoj, ofte kondukante al eksgeedziĝo. Migrado al urboj aŭ eksterlande foje devigas parojn alfronti defiojn en komunikado, adaptiĝo al novaj medioj kaj administrado de atendoj.

3. La influo de publikaj politikoj

En certaj afrikaj landoj, leĝdonaj reformoj pri eksgeedziĝo, la rajtoj de virinoj, kaj la rekono de hejma perforto povas havi signifan efikon al la pliiĝo de eksedziĝoj. Pli granda jura kaj ekonomia aŭtonomio por virinoj favoras la aperon de geedzaj konfliktoj.

III. LA ROLO DE RELIGIAJ KAJ FAMILIAJ NORMOJ EN EKSEDZIĜO

1. La efiko de religiaj kredoj

En multaj afrikaj socioj, religioj, ĉefe islamismo kaj kristanismo, havas grandan influon sur la percepto de geedziĝo kaj eksedziĝo. Kvankam kelkaj religioj toleras eksedziĝon sub certaj kondiĉoj, religia kaj socia etiketo ofte trudas premon por konservi geedziĝon, eĉ en malfacilaj situacioj.

Eksgeedziĝo foje estas vidita kiel socia kaj religia fiasko, kiu pliigas la stigmatigon de divorcitaj homoj, precipe inter virinoj.

2. La loko de la granda familio en la eksedziĝa decido

En certaj afrikaj kulturoj, la grandfamilio (onkloj, onkloinoj, geavoj) ludas decidan rolon en administrado de geedzaj konfliktoj. Tamen, ĝi ankaŭ povas fari la eksedziĝoprocezon pli kompleksa, ĉar ĝi ofte implikas plurajn familianojn, kiuj povas pliiĝi streĉitecojn.

IV. LA SOCIAJ KAJ PSIKOLOGIAJ KONSEKVENCOJ DE EKSEDZIĜO EN AFRIKA SOCIO

1. Efikoj je infanoj

Infanoj ofte estas la unuaj viktimoj de eksedziĝo. En Afriko, kie la grandfamiliaj kaj komunumaj ligoj estas esencaj, eksedziĝo povas konduki al socia izolado de la infano, precipe se la familio de unu el la gepatroj rifuzas zorgi pri la nova familia modelo.

La psikologiaj konsekvoj je infanoj povas esti seriozaj, iras de emociaj malordoj ĝis malfacilaĵoj integriĝantaj en socion.

2. La socia stigmatigo de eksedzuloj

En multaj afrikaj socioj, eksedziĝo daŭre estas vidita kiel fiasko, precipe por virinoj. Ĉi tio povas konduki al forta stigmato, socia izolado kaj eĉ premo rapide reedziĝi, ofte en kondiĉoj, kiuj ne garantias pli bonan estontecon.



3. La efiko al virinoj kaj ilia sendependeco

Eksedziĝo povas marki gravan turnopunkton por virinoj, kiuj en certaj kuntekstoj povas reakiri pli grandan liberecon kaj sendependecon. Tamen, en kunteksto de forta ekonomia kaj socia dependeco, divorcitaj virinoj povas esti elmetitaj al malfortikaj kondiĉoj, kaj foje, ili estas kondamnitaj suferi hejman perforton aŭ socian diskriminacion.

KONKLUDO

Eksedziĝo en afrika socio estas kompleksa fenomeno, kiu rezultas el kombinaĵo de sociaj, kulturaj, ekonomiaj kaj politikaj faktoroj. Streĉitecoj ligitaj al ŝanĝado de tradiciaj familiaj roloj, ekonomiaj defioj kaj kulturaj diferencoj inter generacioj kontribuas al la intenseco de eksgeedziĝoj inter afrikaj paroj.

Krome, religiaj normoj kaj komunumaj valoroj forte influas la percepton de eksedziĝo, kreante pliajn obstaklojn al ĝia administrado. Tamen, ĉi tiu situacio konstante evoluas, kun rimarkinda efiko al familia strukturo kaj la loko de virinoj en moderna afrika socio.

De Honoré Sebuhero el Orienta DR Kongolando

POLLANDO: INTER ŜTATO KAJ EKLEZIO

La ĉefo de la Katolika Informada Agentejo Marteno Przeciecki la 3-an de januaro 2025 alarmis: „La jaro 2024 komenciĝis post transpreno de povo fare de kritikuloj de la Koalicio rilate al Eklezio la 15-an de oktobro 2024. Jam en la unuaj tagoj post starigo de la ministra konsilantaro la ministrino de edukado Barbara Nowacka antaŭdiris limigon de la instruado de religio en lernejoj ĝis nur unu horo semajne. Ĉefministro Donald Tusk anoncis la neniigon de la Eklezia Fonduso kaj ĝia anstataŭigo per la sorto de memvola imposto por la ekleziaj aktivadoj. Estas ankaŭ eldiroj pri la rapida anoncigo al la parlamenta marŝo de la projekto de la leĝo pri la samseksemaj geedziĝoj, kaj unu el ĉi tiuj deziroj de la nova parlamento estis la leĝo permesanta la financadon de la metodo in vitro. Tio ĉio, kaj multaj aliaj postuloj, estigas grandan provokon por la Eklezio kaj por la hierarkio starantaj je ĝia antaŭo“.

Unu jaron post tio oni devas konfesi, ke ĉi tiuj prognozoj veriĝis, sed ankaŭ evidentiĝis kiel forte trompantaj el jura vidpunkto, kaj ankaŭ el la politika kulturo kaj la metodoj de ilia realigado. Ni ekrememoru, ke laŭ la plej nova komunikado de CBOS (Centro de Esploro de la Socia Opinio) en Pollando estas 89 % da katolikoj, 88,2 % de plenkreskuloj deklaras apartenon al la

Romkatolika Eklezio, kaj 0,2 % al aliaj katolikaj ritoj. Ne temas do pri la donitaĵoj el rubrikoj el malnovaj ne plu aktualaj libraj enskriboj, sed pri la konkretaj deklaroj de la plenkreskaj civitanoj. La memdeklaro pri la aparteneco kreskas, jes, kune kun aĝo, sed - tion ankaŭ valoras substreki - en la grupo de la aĝoj 18-24 jaroj tio estas ĝis 85 %. Kaj jen apenaŭ 15 % da junaj personoj atingantaj plenaĝecon, ne identiĝas kun Romkatolika Eklezio. Valoras substreki tion, kiam aliaj silentas pri ĉi tiu temo volante ekigi impreson, ke la problemoj estas margena kaj rilatas pli ĝuste la histerigitajn, pretenditajn klerikarojn, kaj ne la simplajn civitanojn de la demokratia ŝtato. La ŝanĝojn realigitajn surbaze de la ordono de la Ministerio de Edukado kritikis RPO (Advokato de Civitanaj Leĝoj), kaj la unua prezidantino de la Supera Juĝejo Margareta Manowska riproĉis al ĉi tiu ordono interalie rompon de la principo de la „interkonsentita maniero reguli rilatojn inter ŝtato kaj eklezioj“. En la nuna situacio de la grava krizo inter la ŝtato kaj la justica sistemo oni do apenaŭ povas kun espero atendi la eblon solvi ĉi tiun problemon.

Sac. Adamo Pawlaszczyk

El revuo Gość Niedzielny, 51-52/2024

Elpoligis Sławomir Helicumski



ROZARIO

kunpreĝado per ZOOM

**por IKUE, por la paco en Ukrainio,
Palestino kaj ceteraj landoj, kie furiozas
militkonfliktoj.**

Ĉiutage je la 20:15 horo (UTC+2)

Aliĝu ĉe: ikue.reto@gmail.com


EN POLLANDO MI EKAŬDIS LA VOĈON DE VOKIĜO

La decidan influon de mia aliro al la katolika eklezio havis la partopreno de la sankta meso en la preĝejo en loĝkvartalo de Krakovo - Nowa Huta.

La interparolo kun Frato John Bartunek, altlerneja lekciisto, spirita prizorganto sur la plano de la filmo „Pasio“ de Mel Gibson.

Antaŭ ol vi, Pastro, akceptis la katolikan kredon, vi estis protestanto, instruisto, aktoro kaj trejnisto de basbalo. La historio de via aliro al la Katolika Eklezio tio estas la materio por la bona filmo, kaj Pollando kaj la preĝejo Arka Pana (Arkeo de Sinjoro) en Nowa Huta okupas en tio la gravan rolon. Bonvolu rakonti pri tio al la legantoj de Nasz Dziennik.

Je la komenco de miaj studoj de historio en Stanford-Universitato en Kalifornio, Usono, mi pasigis unu jaron en Florenco, Italio, kaj poste dum la printempa kvaronjaro de 1989 mi estadis en Krakovo, tio estis ankoraŭ antaŭ la falo de la berlina murego. Dum la vizito en Italio mi enamiĝis en arton, kulturon kaj historion de la katolika eklezio. Mi estis tiam konvertiĝinta evangeliano, sed mi ne komprenis la katolikismon. Kelkaj instruistoj eĉ instruis min, ke la katolikoj ne estas kristanoj. Mi ne komprenis tiam la katolikan kredon. Mi ĝisfunde esploradis tiam en Pollando la situacion de via lando en la erao de komunismo. Mi ekkonadis dumstude la polan kulturon kaj estiĝis por mi klare, ke la katolika eklezio estis por poloj la vera fortreso de espero kaj lumo en ĉi tiu malfacila tempo. Tio vere ekintrigis min. En Italio mi pli profundigis en historio de la eklezio kaj mi admiris la katolikan arton, kaj en Pollando mi povis observi la vivan katolikan kredon en la vivo de la popolo kaj la eklezion defendantan homojn, la homan honestecon kaj justecon. Mi venis al la preĝejo de Dia Arkeo en la krakova loĝkvartalo Nowa Huta, ĉar mi aŭdis, ke estas tio tre grava kaj simbola loko por tieaj katolikoj. La kaŭzoj de ĉi tiu vizito estis antaŭvideblaj - iun di-



manĉan matenon mi venis tien por ĉeesti la sanktan meson enkadre de la kultura spertado, ligita kun la objekto de miaj studoj.

Mi venis tien pli frue kaj mi trovis la lokon, kie neniu povus ekvidi min. Mi ne komprenis tiam la esencon de la sankta meso, sed mi tre bone memoras la preĝejon plenplenan de homoj. Ŝajnis al mi, ke en la preĝejo mankis benkoj, homoj rekte staris aŭ estis surgenue sur la planko. Almenaŭ tiel mi tion memorfiksis. Kaj pli poste dum konsekro kaj levo de Hostio, la centoj da homoj surgenue, plensilente, adoradis nian Sinjoron, kiu ĵus estiĝis ĉeestanta en Eŭkaristio. Tio tre kortuŝis min. Mi ne komprenis teologion, sed mi ne povis kontraŭi la verecon de la kredo de tiuj ĉi homoj kaj la realecon de la ĉeestado de Dio dum la sankta meso. Revenante pertrame al studenta hejmo, mi ricevis la vokiĝon al sacerdoteco. Mi rekte pripensis tion, kion mi spertis kaj kion mi aŭdis, kiel nia Sinjoro diris al mi tre klare: „John, vi devas sacerdotiĝi“. Mi preskaŭ enhontiĝis, ĉar mi eĉ ne estis katoliko, kaj kiel evangeliano mi neniam pensis estiĝi pastoro. Sed tio estis la komenco de mia vokiĝo.

Kio okazis pli poste, kiel plu evoluis via sorto?

Tio estis printempe 1989, ekde tiama momento ĉi tiu ideo vere neniam malaperis el mia kapo. Baldaŭ mi revenis al Usono, al Kalifornio, por la lasta jaro de studoj. Mi komencis tiam renkontiĝadi kun la katolika pastro, kiu servis en la studenta kampadejo kiel kapelano por la tiea katolika komunumo. Tiamaniere mi povis informiĝi pli pri la katolika kredo. Mi finis studadon kaj mi komencis labori kiel instruisto en liceo. Mi instruis al gejunuloj historion de okcidenta civilizo, mi havis do la okazon trastudi denove la rolon de la katolikismo dum la disvolvo de la okcidenta kulturo, super kio verdire pli frue mi ne kliniĝadis. Tio min tre intrigadis. El la perspektivo de tempo mi vidas, ke rekte ĉiam mi pli ekamadis la katolikan eklezion. Mi havis kelkajn amikojn kaj instruistojn, kiuj akompanis min en tio, kaj mi ĉiam havis la spiritan gvidanton, la estimindan pastron, kiu al mi helpadis. En decembro 1991 mi estiĝis la romkatolika pastro kaj mi tuj volis eniri la klostron, sed estis al mi konsilite, ke mi atendu kaj ankoraŭ tion pripensadu. La laŭvican jaron mi dediĉis al laboro en teatro en Ĉikago, ankaŭ kiel aktoro. Sed mia koro estis la tutan tempon ie alie, ne forlasadis min la penso pri sacerdoteco. La vokiĝo estis tiel forta.

Nun apartenas vi al Ordeno de Legiano de Kristo kaj vi certigas, ke tio estas la loko de la realigado de via persona vokiĝo. Kio influis tiun ĉi elekton?

En la jaro 1993 mi eniris la porpastran seminariejon de Legianoj de Kristo en Cheshire en la ŝtato Connecticut, kaj dek jarojn pli poste en Vigilio de Kristnasko mi akceptis pastran ordinon en Romo. Mi estis post la filozofiaj-teologiaj studoj, post la dujara formacio je novico kaj kelkjara apostola staĝo. Legionistoj posedas profundan formiĝadon - laŭkutime oni bezonas 10-12

jarojn, por esti ordinita. Kaj tiamaniere mi estiĝis la katolika pastro. Mia familio ne estis tro favora pro mia vokiĝo, sed finfine ĝi akceptis mian elekton. Tio, kion mi vere amas en mia ordeno, tio estas la ĝoje ortodoksa - la fideleco al la Eklezio kaj la Sankta Patro. Mi amas la profundigan kaj postuleman formiĝadon, la fortan spiriton de la komunumo, la veran fratecon kaj nian mision, konsistantan je la laboro man-en-mane kun laikuloj, por formiĝadi la kristanajn estrojn kaj renovigadi la kristanan kulturon. Ni renovigadas la kristanan etoson, kie ajn ni estas. Nia spiriteco estas por mi alloga, ankaŭ pro tio, ke ĝi estas senlime rekta - tre kristocentra kaj maria. La formado de la estonta pastro en nia Kongregacio havas ankaŭ la fortan liturgian trajton kaj koncentriĝas ĉirkaŭ Eŭkaristio, kio enskribiĝas en mian personecan spiritecon.

Vi ne estas la ununura persono, kiu konvertiĝis post spertoj kun la estado de Kristo en Eŭkaristio. Tie, kie estas adorata Jesuo en la Plejsankta Sakramento, okazadas grandaj aferoj. Ĉu la eŭkaristia spiriteco akompanas vin tra la vivo?

El la perspektivo de la pasanta tempo mi vidas, ke mi spertadis la ĉeeston de Kristo en la Plejsankta Sakramento, kiu konsolas min kaj plifortigas en diversaj momentoj de la vivo. Mia ordeno estas la parto de la eklezia movado nomata Regnum Christi, kiu arigas laikulojn, konsekritajn laikajn virojn kaj virinojn kaj ankaŭ legionistojn de Kristo. En Regnum Christi ni ĉiam donas la centran lokon al la Plejsankta Sakramento. (...)

Vi estas ankaŭ aŭtoro de libroj pri spiriteco, interalie „Inside the Passion“, kiu estas la malantaŭkulisita priskribo de la filmo „Passion“ de Mel Gibson. Vi estis la spirita konsultanto ĉe ĝia produktado. Kiel vi venis al la plano de la filmo „Passion“ (Pasiono) kaj kian spuron tio postsekvis en via vivo?

Kiam Mel Gibson produktis Pasionon en Romo, mi studis en Italio kaj mi engaĝiĝis en tiu ĉi projekto. Mi prizorgis la spiritantan apogon al personoj laborantaj por ĉi tiu filmo, kaj sekve de tio mi verkis la libron, ĉi tie menciitan. Ĝi enhavas nur oficialajn klarigojn de la sekvantaj scenoj en la filmo. Mi pasigis multe da tempo kun Mel Gibson kaj kun aliaj personoj laborantaj je tiu ĉi filmo, multe ni interparolis, mi respondis al ili multajn demandojn je la temo de kompreno de artaj kaj spiritaj aspektoj, kaj la rezultoj de ĉi tiuj interparoloj troviĝis ĝuste en la libro „Inside the Passion“. Tio estis vere bonega sperto. Kiam mi komencis la laboron je ĉi tiu filmo, mi finis la teologiajn studojn, kaj tuj antaŭ la unua okazo mi akceptis la pastran ordigon. Do, kiam mi preĝadis intence de mia sacerdotiĝo, por celebri la pasionon de nia Sinjoro tra la oferdono de la sankta meso, mi pasigis unu

jaron super la plano de bonega kreo de la filma arto, kiu bildigas la Pasionon de Kristo. Tio estis por mi vere providenca kaj tre kortuŝa travivo, kaj samtempe la konfirmo de mia vokiĝo. Ĉar, kiel mi rememorigis pli frue, mia komenca vojeto de mia kariero, kiam mi estis juna, estis aktorado kaj la skribado de filmaj scenaroj kaj produktado de filmoj. Partoprenante en ĉi tiu filmo, mi kunligis la spertojn artismajn kaj la sacerdotan formiĝon, kaj danke al tio mi povis helpi transporti iujn spiritajn signifojn al la artisma interpretado. Do estis tio bonega sperto. Mi estas dankema, ke mi povis labori kun Mel Gibson, kaj ĉiuj homoj engaĝigintaj en ĉi tiu filmo, kio vere fariĝis la nekutima laboro. (...)

La interparolon gvidis Beata Falkowska
El Taggazeto Nasz Dziennik, januaro 2025
Esperantigis Stanisław Śmigielski

NEKONATAJ MIRAKLOJ DE LA BEATA PATRINO SPERANZA

Ĉu Patrino Speranza helpis savi la vivon de Johano Paŭlo la Dua en la memorinda 13-a de majo 1981?

Horloĝo pendanta sur vando eksonoris la duan horon antaŭ mateno, kiam silenton interrompis ekĝemo de la pli maljuna monaĥino, alpenetranta el la klostra ĉambro en la loko Collevalenza. La doloro, kiun eksptertis la virino, estis komparebla nur al tio, kiun oni sentas, kiam pafaĵo el pistolo trapikas viscerojn. La oldulinjo komencis vomi elfluetantan sangon, sed malgraŭ la granda sufero, ŝi ne prokrastis preĝi. Estis la 13-a tago de majo 1981. La saman tagon post kelkaj horoj la juna turko Ali Aĝca sur la Placo de la Sankta Petro en Vatikano ekpafis kontraŭ Johano Paŭlo la Dua, vundinte lian ventron. Kian ligon kun la atenco kontraŭ la Papo havis la okazintaĵoj en la monaĥeja ĉambro de la Ordeno de Servantinoj de Mizerikorda Amo, kies ĉefa heroino estis la Patrino Speranza?

La Patrino mortas!

Kunfratulinaj tuj strebis venigi kuraciston. Veninta al ĉi tiu loko Doktoro Tommaso Baciarelli ekvidis preskaŭ senvive kuŝantan monaĥinon. Ŝia vizaĝo malkaŝis ĉion – inanicia, terure pala, estis evidente, ke ŝi nur etforte sin ankoraŭ tenas sur ĉi tiu mondo. La apude staranta seĝo estis kovrita per kelkaj mantukoj sorbe malsekigitaj per sango. La kuracisto konsilis tuj fari sango-transfuzon. En la vico por doni la vivodonan fluidaĵon ekstaris kelkaj fratulinaj, sed plej rapide oni devis unue fiksi la sango-grupon de la Patrino Speranza. La specimeno de la sango estis venigita al laboratoria analizo, ĝia rezulto montris, ke la sango enhavas normalan staton, tiel do la transfuzo estiĝis senbezona. Kuracistoj ne sciipovis klarigi, kial la elfluo de la granda kvanto

da sango, la korpo de la Patrino Speranza ne elmontras la simptomojn de anemio.



Ĉu ŝi savis la Papon?

La atestantoj de la tiamaj okazintaĵoj ne dubas, ke kiam la vivo de Johano Paŭlo la Dua estis minacita, la Patrino Speranza oferdonis la noktan suferadon intence al la savo de la Sankta Patro. Fratulino Amanda Perez, prizorginta Patriron Speranza ĝis la jaro 1969 eldiris: „Kiam la saman tagon ni ekaŭdis pri la atenco kontraŭ la Papo, ni ekkomprenis, kio estis la kaŭzo de ĉi tiu terura sangelfluo“. La Patrino Speranza perdis multegon da sango, simile kiel Johano Paŭlo la Dua post la atenco – certe pro tio ŝi akceptis ĉi tiun formon de la oferdo. Konsiderinde estas, ke post la resaniĝo de la Papo lia unua vojaĝo ekster Romon estis ĝuste al la Sanktejo de la Mizerikorda Amo en Collevalenza. La planita tiu ĉi vizito ne antaŭvidis la renkonton kun la Patrino Speranza, sed Dia Providenco ekfaris alie. La ilia renkonto estis eksterkute meksika kaj signifoplena epizodo en la vivo de ili ambaŭ.

Per koro kun Pollando

La Patrino Speranza naskiĝis la 29-an de septembro 1893 en la hispana urbo San-

tomera. Ŝi frue malkovris la vokiĝon, en la aĝo de 21 jaroj ŝi eniris Instituton de Fili-
noj de Kalvario. En la tridekaj jaroj de la dudeka jarcento ŝi translokiĝis al Italujo, kie ŝi establis Ordenon de Servistinoj de la Mizerikorda Amo. La tutan vivon ŝi sin dediĉis al anoncado de la mesaĝo de la Dia Mizerikordo. Eble ĉi tiu hispanino loĝanta en Italio precipmaniere sentis ligitecon kun Pollando, el kiu danke al Fratulino Faustyna Kowalska la mesaĝo pri la Dia Mizerikordo disvastiĝis en la tuta mondo. En la jaro 1964 dum la renkonto kun Karolo Wojtyła ŝi konsilis al la kardinalo el Pollando, kiel plirapidigi la beatigitan procedon de la Fratulino Faustyna. Kiam la Sankta Oficio anoncis retenajn klaŭzojn pro kelkaj eroj de Dzienniczek (Taglibreto), ŝi volonte preĝadis al la Dipatrino Klaranta el Częstochowa, kies bildo troviĝadis en ŝia ĉambro. La bildeton donacis al ŝi kardinalo Stefano Wyszyński. La vivo-vojo de la Patrino Speranza mirige ekligiĝis kun la vivovojoj de la plej grandaj polaj sanktuloj kaj beatuloj de nuntempa erao.

Ŝi mortis la 8-an de februaro 1983. Malgraŭ la klopodoj por suprenlevi ŝin al altaro komencita ankoraŭ dum la pontifikado de Johano Paŭlo la Dua, ŝi estis beatigita en la jaro 2014 fare de la Papo Francisko. Homoj konstante ofertas multnombrajn atestojn de mirakloj ekpetitaj je ŝia propeto, kaj spurojn de ŝia kulto oni povas trovi ankaŭ en Pollando.

Ireneusz Kopryś

El Semajnrévo Bliżej życia z wiarą (Pli proksime al vivo kun kredo), n-ro 5/2023.

Esperantigis Stanisław Śmigiełski

Profitodona komerco

- Kiun komercon vi havas nuntempe?
- Mi vendas leterpoŝt-kolombojn.
- Kaj ĉu tiu afero marŝas bone?
- Bonege! La kolomboj, kiujn mi matene vendas, revenas al mi antaŭ la vespero!

ANALOGIO

Mi aprezas ĉi tiun analogion.

Kiam nia superrega Dio volis krei la fiŝojn, li parolis al la maro.

Kiam nia superrega Dio volis krei arbojn, li parolis al la tero.

Sed kiam nia superrega Dio volis krei homon, li turnis sin al si.

Tiam Dio diris: Ni faru homon laŭ nia bildo kaj simileco.

Rimarko:

Se vi prenas fiŝon el la akvo, ĝi tute mortas.

Kiam oni forigas arbon de la tero, ankaŭ ĝi mortas.

Same, kiam homo malkonektas sin de Dio, li mortas.

Superrega Dio, la Ĉiopova estas nia natura medio.

Ni estis kreitaj por vivi en lia ĉeesto.

Ni devas esti kunligitaj kun li, ĉar nur ĉe li la vivo ekzistas.

Ni restu konektitaj kun nia Kreinto Dio kaj Savanto.

Memoru, akvo sen fiŝo estas ankoraŭ akvo.

Sed la fiŝo, kiun vi vidas per la nuda okulo sen akvo, estas nenio.

Tero sen arboj ankoraŭ estas malpuraĵo.

**Ĉi tio estas mia hejmo,
amo estas mia religio,
Esperanto estas mia lingvo
kaj vi estas mia frato.**



Sed la arbo sen grundo estas nenio.

Dio sen homo estas ankoraŭ Dio.

Sed homo sen supera Dio estas nenio.

Miaflanke, ĉi tiu mesaĝo povas esti utila por vi por vera meditado.

Kaj ke vi dissendu ĝin kun konatuloj kaj amatoj, kiuj havas pozitivan fidon.

Ni restu unuigitaj kaj konektitaj kun nia kreinto Dio!

Dio surverŝu vin per multnombraj benoj sur ĉi tiu tero!

Elkore Honoré Sebuĥoro, DR Kongolando!

Ĉe Dio ne validas sumo de LABORREZULTO, sed sumo de VIVO. Longa vojo kondukas al ekkompreno, ke la ĝusta agado baziĝas je trankvilo, ke la propra movo signifas kvieton, ke kolapso kaj disfalo estas neeviteblaj antaŭŝtupoj de la vera renaskiĝo.

Portugala kamparano veturis en orientan landon. Vidante belegan aŭtomobilon, li demandis en sia lingvo: «Al kiu apartenas tiu aŭtomobilo?». La orientano respondis: «Nerozumjem». La kamparano pensis, ke Nerozumjem (= mi ne komprenas) estas la proprulo, kaj diris: «Sinjoro Nerozumjem devas esti tre riĉa homo». Post kelkaj horoj li vidis funebbron kaj demandis: «Ĉu vi scias, kiu mortis?». La orientano repondis: «Nerozumjem». La portugalo diris ekscitite: «La riĉa Nerozumjem mortis kiel ĉiuj mizeruloj. Li devis forlasi ĉiujn siajn riĉaĵojn». (EK 1977)

La entreprenisto genuas en preĝejo petante: Sinjoro Dio, donu, ke mi estu paciencema... sed TUUUJ!!!

SERĈU SENCON DE LA VIVO

El libreto Dek paŝoj al ĝojo, 2020, de la aŭtoro Sac. D-ro Max Kaŝparŭ

La ŝipestroj de ĉiuj ŝipoj devas koni tri aferojn.

La regulojn de la martrafiko, do la informojn pri tio, kiel navigadi kaj ne kunpuŝi kun alia ŝipo, principojn de zorgoj pri la teknika stato de la ŝipo kaj nomon de la haveno, kiun la ŝipo devas atingi.

Ĉiu homo estas samtempe kapitano kaj stiristo de la propra vivo. Kaj simile kiel la ŝipestro li devas koni regulojn de la socia agado kaj sinteno, por tielnomate ne frapuŝi, li devas scii, kiel vivi por transvivi, kaj li devas koni sencon de sia vivekzisto. Sed se li ne konas celon, nomon de haveno, eĉ se li havas bonan kaj modernan ŝipon, li iĝas Erarvaga nederlandano. Momenton li navigas norden, poste suden, momenton orienten kaj momenton okcidenten. Li voj-eraras.

Sed la sencon de la vivo li ne serĉas, sed malkovras. Por ke homo estu pli feliĉa, li



bezonas lukton kaj penadon pri iu celo, kiu tion indas. Se ni ne konas sencon de la vivo, ni malkovras ĝin. Ĉar jam la malkovrado de la vivsenco mem donas al la vivo sencon.

Sed se ni perdas vivvertikalon, ni kun tio perdas ankaŭ la horizontalan direkton.

Ja la senco de nia ekzistado estas, kune kun amo, granda motivigo por pli ĝoja vivo.

PRI NENIO REZIGNU

Al iu bienposedanto enfalis en la malplenan puton maljuna azeno. La kamparano hezitis. Ĉu li provu la azenon eltiri, aŭ lasi ĝin trankvile en la putu morti? Ĉar la maljunan azenon li ne plu bezonis kaj la putu estis pliajn jarojn senakva, li decidis ĝin eĉ kun la azeno ŝutplenigi. Li do ĉiutage alportadis al la putu ĉiujn hejmajn forfaĵojn kaj per ili li la puton plenigadis.

La azeno, sur kies dorson ĉiutage faladis balasto malagrablanta al ĝi vivon, ĝin ĉiam el la dorso deskuis kaj tresprenis. Tiamaniere ĝi ĉiam troviĝis pli kaj pli alte. Dumtempe la ĉiutagaj ŝarĝoj ĝin el la putu liberigis.



Iu saĝa homo diris: „Kiam homo havas kialon, li eltenas ĉiun kielon.“

Estas saĝe de tempo al tempo preni ekzemplon eĉ de la maljuna azeno.

LA SACERDOTO STARAS PLI SUPRE OL REĜO

„La trono de la sacerdoteco estas establita en la ĉielo: estas al ĝi konfidita tio, kio apartenas al la ĉielo. Tio, kion la sacerdoto decidis ĉi tie surtere, Dio aprobas en la ĉielo...

La devo de la reĝo estas direkti la surterajn aferojn, sed la aŭtoritato de la sacerdoto devenas el la ĉielo. Al la reĝo estas konfideite tio, kio estas ĉi tie surtere, al la sacerdoto tio, kio estas enĉiele...

Al la reĝo estas konfideitaj korpoj, al la sacerdoto animoj.

La reĝo pardonas impostajn ŝuldojn, la

sacerdoto ŝuldojn de la pekoj.

La reĝo uzas devigojn, la sacerdoto nur kuraĝigojn.

Tiu unua regas perforte, tiu dua per konvinkoj.

La reĝo havas materiajn armilojn, la sacerdoto spiritajn. La reĝo batalas kontraŭ barbaroj, la sacerdoto kontraŭ demonoj.

Tial la regado de la sacerdoto estas pli supera ol de la reĝo.“

*S-ta Johano Orbuŝa (†407),
4-a homilio: Mi vidis Sinjoron*

LA NEERARIPOVA KREDO

„Dio estas vero; kaj al ni estas donite, ke ni tiun veron meze de nia popolo ekaŭdu, ke ni ĝin ripetadu kaj heroldadu, kaj tion per niaj lingvoj, per niaj homaj vortoj kaj frazoj. El tio la eklezio derivas la devon la kredon en kompreneblaj kredartikoloj ankaŭ eldiradi kaj pluen transdonadi.“

S-ta Johano Paŭlo la Dua (1920-2005)

* * *

„Ni estas persone respondecaj pri ĉiu peceto de la Dia regno, kiun ni reprezentas. Nur kiam Kristo fariĝos la ununura direktivo de nia agado, kiam la amo al Dio kaj al la homoj senreziste trafenetras el ni eksteren, nur poste Kristo tiutempe en ni naskiĝos kaj la paco en la mondo povos ekregi.“

Sac. Werenfried van Straaten (1913-2003)

NESKUIGEBLE FORTA FIDO

„La katolika fido, kiel neskuigeble vi estas forta, kiel profunde enradikigita, sur kiel stabila roko vi estas konstruita! La ĉielo kaj la tero forpasos, sed vi neniam forpasos. La tuta mondo al vi dekomence kontraŭstaris, sed vi estis pli potenca kaj ĉiam vi triumfis.

Kaj tio estas venko venkinta la mondon: nia fido. (1 Joh 5,4)

Ĝi subigis potencajn reĝojn al Kristo, akiris naciojn al obeemo al Kristo.

Kio donis al apostoloj kaj martiroj forton, ke ili surmetu sur sin hardajn batalojn kaj gravajn punojn, se ne la fido je Resurrekto? Kio instigis ermitojn, ke ili malmulte

aprezu profanajn ĝojojn kaj malŝatu mondan gloron, piedpremu riĉecon kaj vivu en ermitejoj solecan vivon, se ne la fido?

Kio nuntempe kondukas verajn kristanojn al tio, ke ili ignoru komforton, ne rifuzu malagrablaĵojn kaj akceptu kaj toleru tion, kio estas malfacila kaj klopoda?

La fido, energianta per amo (Gal 5,6), donas forton rezigni nuntempajn bonaĵojn kaj en espero pri la bonaĵoj de la estonto anstataŭi la nuntempajn je la estontaj.“

*El la lasta oracio de la s-ta
Fidel el Sigmaringen (1578-1622),
la kapucena martiro*

KIE ESTAS AMO, TIE ESTAS DIO

Daŭrigo de la rakonto de Lev Nikolajeviĉ Tolstoj (1828-1910).

El rusa lingvo tradukis en la jaro 1912 N. Kabanov.

“Fariseo, videble, estis tia sama, kiel mi. Ŝajnas, li memoris nur pri si mem. Li zorgis nur pri tio, ke li trinku teon, ke li estu en varmo, en bonstato, sed li ne pensis pri la gasto. Li memoris pri si mem, sed tute ne zorgis pri la gasto. Kaj kiu estis la gasto? Sinjoro mem. He, se li venus al mi, mi, certe, ne farus tiel.

Kaj Avdeiĉ sin apogis sur ambaŭ kubutoj kaj ne rimarkis, kiel li dormetiĝis.

“Marteno!” subite io ekspiris super lia orelo. Marteno ekmaldormiĝis.

“Kiu estas tie?”

Li sin turnis, ekrigardis la pordon, ne-niu estas. Li denove dormetiĝis. Jen subite li klare aŭdas: “Marteno, he, Marteno! rigardu morgaŭ sur la straton, mi venos”.

Marteno rekonsciiĝis, sin levis de seĝo; komencis froti la okulojn. Kaj li mem ne scias, ĉu li aŭdis tiujn ĉi vortojn en sonĝo aŭ maldorme. Li estingis la lampon kaj kuŝiĝis dormi.

Matene, ankoraŭ antaŭ tagiĝo Avdeiĉ sin levis, preĝis al Dio, hejtis fornĉon, metis sur fornĉon brasikan supĉon, kaĉĉon, preparis samovaron, surmetis antaŭtukĉon, sidiĝis apud la fenestro por labori. Avdeiĉ sidas, laboras kaj mem ĉiam pensas pri hieraŭa. Kaj li pensas dumaniere: jen li opinias, ke ĝi ŝajnis; jen li opinias, ke li vere aŭdis voĉĉon. Nu, li pensas, ja ĝi okazadis.

Marteno sidas apud la fenestro kaj ne tiom laboras, kiom rigardas tra la fenestro; kaj kiam iu pasas en nekonataj botoj, li kliniĝas, enrigardas tra la fenestro por ekvidi ne nur piedojn, sed ankaŭ vizaĝĉon. Kortisto pasis en novaj feltŝuoj, akvoportisto pasis, poste maljuna soldato en malnovaj feltŝuoj, kun ŝovelilo en manoj. Avdeiĉ ekkonis lin laŭ feltŝuoj. Lia nomo estis Stepanoviĉ, kaj li loĝis ĉe najbara komercisto pro favoro. Li helpadis kortiston. Stepanoviĉ komencis



deŝoveli neĝĉon, kontraŭ la fenestro. Avdeiĉ ekrigardis lin denove, komencis labori.

Videble, mi fariĝis tute malsaĝa pro maljuneco, ekmokis Avdeiĉ sin mem. “Stepanoviĉ deŝovelas neĝĉon, kaj mi opinias – Kristo iras al mi. Mi tute malsaĝiĝis, maljunulaĉo.”

Tamen Avdeiĉ baldaŭ denove komencis rigardadi tra la fenestro. Kaj jen li vidas: Stepanoviĉ apogis la ŝovelilon al muro kaj mem ĉu li varmiĝas, ĉu li ripozas.

„Li estas homo maljuna, malsanema; videble, li eĉ ne havas fortojn por ŝoveli neĝĉon,” pensis Avdeiĉ. “Trinkigu mi lin per teo, ja ankaŭ la samovaro ekboliĝis”.

Avdeiĉ sin levis, metis la samovaron sur la tablon, ekinfuzis teon kaj frapis per fingro je vitro. Stepanoviĉ sin turnis kaj aliris al la fenestro. Avdeiĉ logis lin kaj ekiris malfermi la pordon.

“Eniru, varmiĝu,” li diris. “Ja vi malvarmiĝis.”

“Kristo savu vin; vere ostoj doloras,” diris Stepanoviĉ.

Stepanoviĉ eniris, forskuis de si neĝĉon, komencis viŝi piedojn, por ne restigi malpurajn postsignojn sur planko, kaj mem li

ŝanceliĝas.

“Ne penu viŝi. Mi viŝos plankon; iru, sidiĝu,” diris Avdeič. “Jen, trinku teon!”

Kaj Avdeič verŝis teon en du glasojn, alŝovis unu glason al la gasto kaj mem elverŝis teon el sia glaso en subtason kaj komencis blovi.

Stepanovič eltrinkis sian glason, renversis ĝin, metis sur ĝin restaĵon de sukero *) kaj komencis danki. Kaj videble, ke li deziras ankoraŭ.

“Trinku ankoraŭ,” diris Avdeič kaj verŝis ankoraŭ po unu glaso al si kaj al la gasto.

Avdeič trinkas sian teon kaj mem de tempo al tempo rigardas straton.

“Ĉu vi atendas iun?” demandis la gasto.

“Ĉu mi atendas? eĉ mi hontas diri, kiun mi atendas. Ĉu mi atendas, ĉu ne, sed unu vorto falis al mi en la koron. Ĉu ĝi estis fantomo, ĉu tiel, mi mem ne scias. Jen kio, mia fratulo; mi legis hieraŭ Evangelion pri Kristo, kiel li suferis, kiel li iradis sur tero. Ĉu vi aŭdis pri tio?”

“Jes, mi aŭdis,” respondis Stepanovič, “sed mi estas homo malklera, mi ne scias legi.”

“Nu jen, mi legis pri tio sama, kiel li iradis sur tero; jen mi legas, kiel li venis al la fariseo, sed tiu ne faris al Li renkonton. Nu jen, mi legis, fratulo, pri tio sama, kaj pensis: kiel mi akceptus Kriston kun honoro. Se okazus, ekzemple, al mi, mi pensas, mi akceptus lin tiel bonege. Kaj li eĉ ne faris akcepton. Jen mi pensis tiel kaj ekdormetiĝis. Nu, mi ekdormetiĝis, mia fratulo, kaj aŭdas. iu vokas min laŭnome; mi min levis: voĉo, kvazaŭ iu murmuretas: atendu, li diras, mi venos morgaŭ! Jes, dufoje! Nu jen, ĉu vi kredas, ĝi falis en kapon, mi insultas min mem, tamen mi atendas lin, Kriston.”

Stepanovič balancis kapon kaj diris nenion; li eltrinkis teon, metis glason flanken, sed Avdeič denove starigis glason kaj verŝis ankoraŭ.

“Trinku por sano. Ja mi ankaŭ pensas,

*) *Rusa kutimo por montri, ke oni ne plu deziras trinki.*

kiam Li iradis sur tero, Li malŝatis nenion, amikis pleje kun simpla popolo. Li vizitis ĉiam simplajn homojn kaj elektis disĉiplojn pleje el tiaj samaj, kiel ni, pekuloj, el laboristoj: kiu altigas sin, li diras, tiu estos malaltigita, sed kiu malaltigas sin, tiu estos altigita. Vi, nomas min, Li diras, Sinjoro, kaj mi – lavos viajn piedojn. Kiu volas, Li diras, esti unua, estu servanto por ĉiuj. Ĉar, li diras, feliĉegaj estas mizeruloj, humiluloj; kvietuloj, kompatemuloj.”

Stepanovič forgesis sian teon; li estis homo maljuna, larmema. Li sidas, aŭskultas kaj larmoj fluas sur la vizaĝo.

“Nu, trinku ankoraŭ,” diris Avdeič.

Sed Stepanovič faris krucon signon, dankis, deŝovis la glason kaj sin levis.

“Mi dankas vin,” li diras, “Marteno Avdeič, vi gastigis min, vi satigis animon kaj korpon.

“Mi petas, vizitu alian fojon, mi ĝojos je gasto,” diris Avdeič.

Stepanovič foriris, kaj Marteno elverŝis restintan teon, eltrinkis, ordigis tablon kaj denove sidiĝis apud la fenestro por labori. Li laboras kaj mem ĉiam rigardadas tra la fenestro, atendas Kriston kaj ĉiam pensas pri Li kaj pri liaj aferoj. Kaj en lia kapo ĉiam estas diversaj Kristaj paroladoj.

Du soldatoj preterpasis, unu en regnaj botoj, alia en siaj; poste pasis mastro de najbara domo, en purigitaj galoŝoj, poste panisto kun korbo. Ĉiuj pasis pretere; kaj jen iras apud la fenestro virino en lanaj ŝtrumpoj kaj en vilaĝaj ŝuoj. Ŝi pasis preter la fenestro kaj haltis apud interfenestraĵo. Avdeič kliniĝis, ekrigardis ŝin, vidas: fremda virino, malbone vestita kaj kun infano stariĝis apud muro dorse al vento kaj envolvas infanon, sed estas nenio, en kio envolvi. Vestaĵo de la virino estas somera kaj malbona. Kaj Avdeič aŭdas: la infano krias, kaj ŝi admonas ĝin kaj neniel povas trankviligi. Avdeič sin levis, eliris tra pordo ŝtuparon kaj vokis:

“Saĝulino! he, saĝulino!”

Daŭrigota

NENIAM PERDU ESPERON EN LA VIVO

Iam, en la koro de la arbaro, vivis du neverŝajnaj amikoj: leporo kaj testudo. Leporo estis konata pro sia senlima energio, dum testudo estis saĝa, sed malrapida.

Iun tagon terura sekeco trafis la arbaron. Tiam la abunda verdaĵo bruniĝis, kaj la bestoj suferis. Manĝaĵo estis malabunda kaj malespero ekestis inter la estaĵoj. Leporo, kiu kutime ĉirkaŭkuris, nun sidis sub velkinta arbo.

Testudo, rimarkinte la malgajon de leporo, alproksimiĝis al ĝi. „Mia amiko“, ĝi diris, oni ne devas perdi esperon eĉ en la plej mallumaj tempoj, ĉiam estas vojo antaŭen.

„Sed kiel“? respondis leporo kun la oreloj malleviĝintaj. „La riveroj sekiĝis, kaj la suno bruligas ĉion“.

Momente ekpensis testudo. „Aŭskultu atente“, ĝi diris. „Preter la montetoj kuŝas legenda puto – la puto de senfina espero. Ĝiaj akvoj laŭdire povas revivigi eĉ la plej dezertan teron“.

La okuloj de la leporo larĝiĝis. „Sed ĝi estas tiel for!“ Kaj mi estas rapida, sed ne sufiĉe rapida por alveni ĝin sola.“

La testudo ekridetis. „Ĉi tie eniras niaj fortoj. Vi iros antaŭen, kaj mi sekvos laŭ mia propra ritmo. Kune ni atingos la puton.“

Kaj tiel, leporo ekkuras, ĝiaj kruroj malklariĝis dum ĝi kuris trans la dezertan pejzaĝon. Testudo ruliĝis malantaŭe, stabila kaj decidita. Survoje, ili renkontis defiojn: dornajn arbustojn, krutajn klifojn kaj brulantajn sablojn. Sed ili daŭrigis, ĉiu fidante sian fortan.

La tagoj fariĝis semajnoj. La leporo laciĝis, sed ĝi rememoris la neŝanceblan spiriton de testudo. „Mi ne povas rezigni“, ĝi pensis. „La testudo kredas al mi“.



Fine ili atingas la preteratentantan monteton la puton de senfina espero. Leporo kolapsis, anhelante, dum la testudo alvenis, ĝia testuda ŝelo estis polvokovrita, sed ne rompita.

La brilanta puto-profunda lageto da kristalklara akvo. La leporo trempis sian piedon, kaj la akvo ekbrilis kiel diamanto. „Ĉu ĉi tio estas reala?“ Ĝi demandis laŭte. Testudo kapjesas. „Trinku, mia amiko, lasu la esperon flui tra vi“. La leporo trinkis, kaj ondo de energio plenigis ĝin. Ĝiaj kruroj sentis esti pli malpezaj kaj ĝia koro leviĝis. „Dankon“, li diris al testudo.

Morala kuraĝigo: „Fido estas esenca, kaj ni neniam devas perdi esperon, eĉ en la plej malhelaj vivmomentoj.“

*Kursgvidanto de Verda Stelano-Klubo
en Kivu Honoré Sebuĥoro*

DIO BENU Vydavatel: IKUE-Katolická sekce Českého esperantského svazu. Adresa redakce: IKUE-Katolická sekce ČES, Tršická 6, CZ-751 27 Penčice. Zodpovědný redaktor: Miloslav Šváček, tel. +420 732 420 675, e-mail: m.svacek@seznam.cz. Bank. spojení:

Česká spořitelna, a.s., Přerov, číslo účtu: 1647837113/0800.

IBAN CZ80 0800 0000 0016 4783 7113 BIC GIBACZPX

Registrační číslo MK ČR: E 12647. ISSN 1803-8387 (Print), ISSN 3029-701X (On-line).

HIMNO DE LA KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ

La Sinjorino de la Espero

Muziko de Egidio Circelli OFM

Tekston laŭ P. M. Carolfi kaj sac. Sz. Wejland prilaboris W. Tomaszewski

Solene e deciso



1. E - spe - ran - ta nin ko - lek - tu sen - to, a - kti -



vi - gu ĝi I - KU - E - a - nojn; nin pa - tro - noj vo - ku al kon -



sen - to, sank - taj Pi - o, Ma - ksi - mi - li - a - no!

a tempo



Ho, Sin - jo - ri - no, Ni - a E - spe - ro, do - nu *kon-kor-don*,



Pa - trin' de Di'. Vi de l' êi - e - lo gar - du la te - ron,



Êir-mu la mon-don, reg - nu sur ghi! re - gnu sur ghi!

2. IKUE-a penu familio / la militon igi for de l' tero, / por ke ĉiu raso kaj nacio / povu pace vivi en prospero. / Ho, Sinjorino, Nia Espero, / donu la *pacon*, Patrino de Di'; / Vi de l' ĉielo gardu la teron, / ŝirmu la mondon, regnu sur ĝi!

3. Vortoj Kristaj veku nian ardon, / frata amo gvidu nin al celo, / sub la
verda agu ni standardo / kaj la Kruco brilu sur la stelo! / Ho, Sinjorino, Nia
Espero, / donu la *amon*, Patrin' de Di'; / Vi de l' ĉielo gardu la teron, / ŝirmu
la mondon, regnu sur ĝi!